

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRÉSIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R.Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
C.c.p. Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 3 F. Abono: 10 F. Kotizo: 2 F. Sumo: 12 F. ====

xx

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de decembro, marto, junio kaj septembro.

xx

---- N° 119 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

---- JANUARO 1979 ----

xx

BILETO DE LA PREZIDANTO.

Au moment où une année succède à l'autre, je ne manquerai pas d'adresser à tous ceux qui nous lisent, à tous nos amis, mes vœux pour une action généreuse et fructueuse dans le mouvement qui est la raison d'être de notre appartenance à notre association.

Nous souhaitons tout particulièrement nous rencontrer et mieux nous connaître au cours de notre congrès qui doit être l'occasion d'un contact amical sous le signe de l'Espérance et d'une impulsion nouvelle pour notre action. Vous trouverez d'autre part les informations qui concernent notre rendez-vous de Lille.

Un autre congrès nous est proposé, celui-ci international: Luxembourg sera le lieu de rencontre, au mois d'Août, des différentes ligues nationales membres de I.K.U.E. Nous renvoyons nos lecteurs à Espero Katolika pour les détails d'organisation et le programme de cette importante manifestation.

Êtes-vous abonné à l'organe officiel de notre Union Internationale Espérantiste Catholique? Espero Katolika, qui est l'une des plus anciennes publications régulières en Esperanto, a un rôle important parmi les nombreux périodiques publiés un peu partout dans le monde.

Il est à noter que la cardinal Wojtyła, qui vient d'être appelé au Souverain Pontificat, avait adressé, à l'occasion du 75ème anniversaire de la naissance d'Espero Katolika, un message de vœux et d'encouragements à cette revue. Il avait également accepté d'accorder son patronage au 37ème congrès de I.K.U.E. à Čenstoňova en 1977.

Après le rappel à Dieu de ses deux prédécesseurs, l'élection de Jean-Paul II a été le grand événement religieux de l'année. Il apparaît comme un signe de l'Esprit Saint que l'homme choisi soit né et ait vécu dans un monde éprouvé dans sa chair et dans son âme, évêque d'un pays où la vitalité du Christianisme fait face à la situation tragique d'un monde dominé par l'athéisme agissant.

Unité des Chrétiens, dignité de la personne humaine, respect de la pensée religieuse des non-chrétiens, telles sont les propositions qu'il a faites au monde, rappelant que Jésus est venu, non pour gouverner les peuples, mais pour leur apporter le salut en Dieu. Ne voyons-nous pas, dans l'univers de l'Espéranto, un terrain privilégié pour y semer cet idéal.

R.Cl. COLAS.

SUPEREGA OFERDONO

Sinjoro, prenu kaj akceptu
mian tutan liberecon, mian memoron
mian inteligentecon kaj mian tutan volon,
mian tutan havaĵon kaj posedaĵon.

Vi ĉion donis;
al Vi mi redonas ĝin.
Ĉio estas via; disponu ĝin
laŭ via tuta volo.

Donu al mi vian amon
kaj gracon:
tio sufiĉas por mi.

(S-ta Ignacio de Lojola,
Spiritaj ekzercoj n° 234)

=====

ABRAHAMO, PATRO DE LA KREDANTOJ

"Abraham!, ĉu vi fidas? Nu, prenu vian filon,
La unusolan, kiun vi amas, Isaakon,
Kaj iru en la landon merijan kun li brakon.
Enbrake, plej patrece ... tenante la tranĉilon."

Frumatene la patro, prenante la hejtbrilon
Kun la necesa ligno, de bivak' en bivakon,
Tritage alpaŝadis por trafi l' dediĉakon.
Ĉu vi povas plugardi la pervektan trankvilon?

"Kie estas la ŝafo de l' tuja brulofero?"
"Ne timu, plej amata, Dio mem antaŭvidos."
Silante du alsupris ĝis la kredokonkero:

Konstruo de altaro, kie fajro avidos
Viktimon ĵus buĉitan en malluma vespero!
"Ne etendu la manon: Vin mi ĉiam konfidos."

DEGRELLE Roger 6/2/78

=====

PENSOJ (daŭrigo)

La plej spertaj travivaĵoj de maljunulo
Al li donas fajnan saĝon en akumulo
Kaj li povas multajn helpi dum tuta tago
Per konsiloj, per avertoj kaj pensa sago

Ve! Kelkfoje en lia kap!
Pro altpunkta kripla kaduk!
Krie kantas kaprica klak!
Karusela karesas skrap!

DEGRELLE Roger

La plej bela kaj muzika harmonio
De la lingvo Esperanto, simfonio
De buntriĉo gajaj voĉoj ĉie kantas
Survizaĝe vera ĝojo diamantas.

Iu vortas por sia flank!
Kaj atakas sen ia mank!
Violonas per fuŝa kord!
Nu ĉiamas la malkonkord!

=====

ELDONA FONDUSO (daŭrigo)

S-ino Vincent: 50 F. Sume por 1978: 665 F.

KORAN DANKON AL ĈIUJ DONACINTOJ KAJ ... DONACONTOJ!

=====

MEMBROJ BONFARANTOJ 1979

- 1) S-ro BESSIERE (I & V)
- 2) S-ro LE MARQUAND (C-du-N)

Gratulon kaj dankon al niaj bretonaj fratoj!

Protokolo de la komitatkunveno de la 8-a de oktobro 1978 en Paris

Ĉeestas: F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Colas, Despiney, Véron kaj Villeneuve.
Petis senkulpigon: S-ro Bessière, P. Bourdon (skribis pri kelkaj punktoj) kaj P. Degrelle, kiu informis perletere pri ĉiuj punktoj de la tagordo.

1. Korekto de preterlaso en la protokolo de la antaŭa kunveno: P. Degrelle sendis senkulpigan leteron donantan liajn vidpunktojn.
2. Raportoj pri la kongresoj en Clermont-Ferrand (Diservo en la katedralo celebri-
ta de P. Kindler) kaj Varna (1000 partoprenantoj en la ekumena Diservo en la orto-
doksa katedralo)
3. Pro la okazigo de la UFE-kongreso en Lille, la komitato decidas rezigni pri
Sens kaj akceptas kongresi en Lille de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 79.
Proponita temo: "Kateĥizo pri kredinstruo al la geknaboj."
4. P. Bourdon kontaktos S-ron Fabre pri eventuala organizo de IKUE-kongreso en
Lourdes.
5. Prepare al la IKUE-kong. en Luksemburgo (7-14/8/79), la komitato atente pristud-
das kaj akceptas la argumentojn de P. Degrelle pri oĉeo al la statuto de IKUE rila-
te la voĉdonadon. FKEA pritraktos tion en Lille okaze de sia kongreso.
6. Verko de P. Korytkowski: la franca eldono estos preta en decembro. Prezo: 10 F.
7. "Jeune Chrétien" daŭre disponebla ĉe la ĝenerala sekretario.
8. FKE: ĝia prezo alĝustigiĝas al tiu de la interna letera afranko.
9. Trafa informado apud la franca episkoparo fare de nia ĝenerala sekretario.
10. Kursoj: ili iras de geknaboj (S-ro Sevin) al triaĝuloj (S-ro Despiney).
11. IKEK kunigas 40 geknabojn el 8 landoj.
12. Meslibro eldonita de la IKUE-centro. Ĉiu komitatano aĉetas ekzempleron por
legi kaj doni sian opinion.
13. S-ro Despiney, respondeculo pri la sidejo, vizitigas la nove aĉetitajn ejojn.

eltiraĵo el la protokolo de R. Despiney.

*

Protokolo de la komitatkunveno de la 10-a de decembro 1978 en Paris

Unuafoje, la kunveno okazas en la nova salono de la UFE-sidejo.

Ĉeestas: F-to Marmou (parte), S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau,
S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve (parte).

Petis senkulpigon: S-roj Bessière kaj Véron; P. Bourdon, kiu telefonis el Lille
por doni utilajn informojn rilate la tagordon.

P. Degrelle ne povis ĉeesti pro sia partopreno en samdata studperiodo

"Esperanto parolata" en Nancy.

Observas: S-ino M.L.Vincent.

1. Post la preĝo, la ĝenerala sekretario legas la protokolon de la antaŭa kunveno.
Ĝi estas unuanime akceptita, samekiel la tagordo.
2. Rilatoj IKUE-FKEA. Post diskutado, la komitato, konstatante la nesufiĉan preci-
zecon de la IKUE-statuto rilate la voĉdonadon, decidas lasi la anojn liberaj en
ilia voĉdonado, sed opinias necesaj: a) la aprobo de la nuna voĉdonado fare de la
ĝenerala kunveno en Luksemburgo.
b) la verkado de preciza interna regularo por la estontaj balotoj.
3. Kongreso en Lille: dank' al informoj transdonitaj de F-ino Preux kaj S-ro Des-
piney, la komitato starigas la programon proponitan de P. Bourdon. Tiu ĉi proponas
ekumenan diservon kun - se eble - homelio de S-ino Koopmans, nederlanda pastorino.
La ĝenerala sekretario kontaktos S-ron Bachelier, franca respondeculo de KELI.
4. Venontaj IKUE-kongresoj: a) 1979: Luksemburgo
b) Ĉu ni povos organizi kongreson en Lourdes poste.. kaj kiam? P. Bourdon havis
bonan kontakton kun P. Bonamy, dominikano, prizorganto en Lourdes de "Mission de
l' Immaculée du P. Kolbe." Tiu pastro lernas Esperanton kun helpo de S-ro Ribot.
5. La libro "Une langue internationale pour le monde et pour l' Eglise", kies tek-
sto estas parte eltirita el la verko de P. Korytkowski, estos baldaŭ je dispono.
Ĝi enhavas 98 paĝojn.
6. Esperanto en la gazetaro: "Le journal de la Paix" regule aperigas niajn informojn
mojn. En "La Croix" aperis bonaj artikoloj. Bedaŭrinde ankaŭ aperis malafabla le-
tero kontraŭ Esperanto. Responde al protesta letero de S-ro Despiney, "La Croix"

./..

promesis denove aperigi leterojn de esperantistoj.

7. Diversaĵoj: a) S-roj Amouroux kaj Despiney aperigis poresperantan informon en parolajn anoncfoliojn.
b) S-ro Despiney sendis nome de Fkea telegramon al la nova Papo Johano-Paŭlo II-a (23-an de oktobro)
c) la venonta komitatkunveno okazos la 11-an de marto 1979.

Protokolis R. Despiney.

SUR VIA KALENDARO

A. PRINTEPAJ SKIFERIOJ EN SVISLANDO. Asocio de la germana katolika junularo organizas skiferiojn en Serneus/Grizona. Partoprenas gestudentoj kaj gelaboristoj. Esperantistoj intergermanlingvanoj. 8-a/17-a/24-a de marto. 1979. Informoj: ESPERANTO, Kirchplatz 4, D - 7731 UNTERKIRNACH.

B. GRESILLON.

PRINTEMPO: 11-an de aprilo ĝis la 18-a matene. Renkonto de infanoj, praktika pedagogio.

SOMERO: PRELEGOJ (2-21/7/79)

KURSOJ (23-a de julio ĝis 11-a de aŭgusto)

ARTLABOROJ (13-a de aŭgusto ĝis 1-a de septembro)

Informoj: Esperanto, Kulturdomo Grésillon 49150 - BAUGE Tel. (41) 89 10 34

LINGVA ANGULO

Nur 5 respondoj atingis min, tiuj de S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M).

- 1) c' est à se taper le derrière par terre: pro tio oni teren puŝbatus al si la postaĵon, harŝirinde (B); tio estas ridindega (G); tio estas mirkonsterniga (L).
2) il n' a pas mis sa dernière chemise: venos lia tempo de puno, li pentos pro tio (B); li ankoraŭ ne estas sian lastan ĉemizon (D); li povas ankoraŭ longe vivi (G); li ankoraŭ ne estas senrimeda, li ne uzis sian lastan rimedon (L).
3) il n' est pas à prendre avec des pincettes: oni ne tuŝus lin per tenilo (B); li estas kolerega (G); li estas pleje incitigema, malakceptema (L); ne kontaktebla pro humoraĉo (M).
4) je ne mange pas de ce pain-là: ne per tia vivpano mi nutras min, tiajn farojn mi abomenas, tiajn agmanierojn mi malaprobas (B); mi rifuzas vian hontindan proponon (D); mi tute ne konsentas pri tia malhonesta negoco (G); mi ne perdamas, pernocas panon (L).
5) on a l' âge de ses artères: la sano akordiĝas kun la aĝo (G); arterifarto signas aĝon (L); laŭfarte oni kalkulu aĝon, de farto dependas aĝopezo (M).
6) on en fera quelque chose si les petits cochons ne le mangent pas: li iĝas gravulo se ne malfavoros lin la sorto, se neniu metos trabojn sur lian vojon. (B); li estas progresonta je lerteco (G); nur ŝance li sukcesos, li prosperos (L); damaĝescepte li brile sukcesos (M).
7) pour moi, c' est du thé: tio ĉi lasas min tute indiferenta, neniel gravas por mi (B); mi preferas teon (D); tio aspektas al mi kiel teo (G); teon! mi petas, laŭ mi, tio estas teo (L).
8) étouffer dans l' oeuf: abortiĝi (B, L); ĉesigi aferon je ĝia komenciĝo (G); neniigi ĉe komenciĝo, bari elvolviĝon (L); sufoki ĝermon (M) (legu: abortigi)
9) examiner sur toutes les coutures: traesplori, detale pririgardi, pririgardi laŭ ĉiuj anguloj, rigardi de la kapo ĝis la piedoj (B); atenti ĉiun detalon (D); atenti pri ĉiu detalaĵo (G); ĉiuflanke esplori, detale esplori (L); detalege ekzameni, ĉiufacete esplori (M).
10) expédier avec perte et fracas: malmilde forpeli, forregali (B); forpeli, plenforsendi (D); energie forigi (G); brue kaj damaĝe forregali, frakase forregali (L); furiozeksplode forsendi (M).
Rim. 1) kelkaj gramatike ne korektaj esprimoj ne povis esti pritraktitaj.
2) en la No 118 p. 4, bonvolu legi "aspekti distriĝema (kaj ne distra) en la traduko 4) avoir l' air absent.

Unua klasifiko por 1979: 1) S-ro Le Marquand (5p.); 2) en egaleco S-ro Bour-

gois kaj S-ino Michau (3); 4) en egaleco S-roj Dauchez kaj Guillon (2).

ĈIUJ AMASE PARTOPRENU!

Jen la novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois: 1) aller à pas de géant; 2) s' en aller gros Jean comme devant; 3) s' amuser comme des fous; 4) il n' arrive pas à sa cheville; 5) je l' attends au tournant; 6) faire bonne mesure; 7) je n' en connais pas un traître mot; 8) un coup fourré; 9) il danse comme un pied; 10) en désespoir de cause.

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO (FKEA)

*

LILLE 29-an de aprilo/1-an de majo 1979

*

KONGRESEJO: Maison des Dominicains 7, av. Salomon 59000 - LILLE
sin turni al P. BOURDON, sama adreso p.ĉ.k. 1909 49 Y LILLE

ALIGKOTIZOJ: individuo: 20 F
geedza paro: 30 F
infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano, sacerdoto,
religiulo(in)o, KELI-ano SENPAGE

LIMDATO DE ALIĜO: 31-an de marto 1979.

N.B. Nur la unuaj aliĝintoj ricevos dormoĉambron en la kongresejo mem, kiu enhavas nur 19 tiajn ĉambrojn (dulitajn).

*

PROGRAMO

~~Dimanĉo~~ Dimanĉo 29-an de aprilo:
ekde la 15-a horo: akcepto en la Domo de la Dominikanoj
16.30: diservo
post la vespermanĝo: amika kunveno

Lundon 30-an de aprilo:
9.30: ĝenerala kunveno
14.30: debato "Infaneco kaj Esperanto - kultura profito por la geknaboj"
post la vespermanĝo: distra vespero

Mardon 1-an de majo:

Tuttaga ekskurso al Bruges

*

RESTADPREZOJ

vespermanĝo: 15 F
tranoktado: 11 F tagnokta pensiono: 47 F
matenmanĝo: 3 F luado de littukoj (por
tagmanĝo: 18 F la tuta restado): 7 F
ekskurso al Bruges (ĉio entenata) 75 F

BONVOLU KUNPORTI VIAJN BUS- kaj TUALET-TUKOJN.

A G R A B L A N K O N G R E S O N E N L I L L E ! ! !

RENOVIGO DE LA KOMITATO

En 1979 finos sian mandaton: F-ino VANNEAU, P. DEGRELLE, F-to MARMOU kaj S-ro VILLENEUVE. Ili estas reelekteblaj, sed ni volonte akceptos pliajn kandidatojn. Ĉiu ano pli ol 18-jara ja rajtas kandidatiĝi kiel komitatano.

Kaj la kvar elirontaj komitatanoj kaj la novaj kandidatoj bonvolu TUJ anonci sian kandidatiĝon al nia ĝenerala sekretario S-ro R. Despiney.

treto de la gepatroj de la monaĥo, Orazio Forgione kaj Giuseppa Di Nunzio, la du humilaj kamparaĵoj de Pietralcina, kiu la 25-an de majo 1887 havis filon, kiun poste papoj kaj kardinaloj gloris aŭ punis. Ankaŭ la mizera lito, sur kiu P. Pio ripozis unu aŭ du horojn en ĉiu nokto, estis konservita tie, kie ĝi estis. Sub la fenestroj de la ĉelo, etendiĝas la vasta ebenaĵo de Gargano, seka grundo plena de ruĝaj ŝtonoj, de tempo al tempo interrompita de olivarboj.

La vizito al la ĉelo ebligas, pli ol ĉio ajn, reakiri la simplecon, la modestecon, la franciskan spiriton de tiu homo, al kiu oni donacis kastelojn, bienojn, hotelojn, apartementojn, riĉaĵojn en valoro de miliardoj da liroj, kaj kiu fortege strebis donaci ĉion al la malriĉuloj. Neniam tuŝis lin la ideo temi por si mem, aŭ ion donaci al la familianoj.

MENDILO (sendota al P. BOURDON 7, av. Salomon 59000-LILLE)

Nomo kaj adreso:

Bonvolu sendi al mi ekz. de la libro de P. Korytkowski po 10 F + sendkostoĵoj. Mi devontigas min pagi tuj post ricevo de via fakturo.

Dato kaj subskribo:

KONGRESA ALIĜILO

sendota al P. BOURDON 7, av. Salomon 59000-LILLE

NOMO kaj VOKNOMO:

ADRESO:

Mi aliĝas al la FKEA-kongreso kaj pagas kiel kotizon al P. BOURDON p.ĉ.k. 1909 49 ¥ LILLE la sumon de F

Mi uzos la jenajn servojn:

dimanĉan vespermanĝon (1)	lundan vespermanĝon
tranoktadon dimanĉon vespere	tranoktadon lundon vespere
lundan matenmanĝon	mardan matenmanĝon
lundan tagmanĝon	tuttagan ekskurson

Mi proponas la jenajn servojn:

legadon dum la diservo (1)	monkolektadon
kantadon	prizorgadon de la infanoj

Mi alvenos la ...-an de aprilo je la ... horo per aŭtomobilo/vagonaro

Mi forveturos la ...-an de aprilo/majo je la ... horo

Mi bezonas ... fervoja(j)n rabatilo(j)n

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu familiano. Uzu samformatan paperon.

Nepre aliĝu ANTAŬ LA 31-a DE MARTO 1979.

(1) Forstreku la senutilaĵon.

VIZITANTE LA LANDAN KONGRESON, ANKAŬ VIZITU LA KATOLIKAN

ĜIS REVIDO EN ~~XXXX~~ LILLE,

LA NORDA ĈEFURBO!!!

KOTIZTABELO 1979

IKUE kun "Espero Katolika" 48 F
 Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 12 F
 infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 6 F
 Bonfaranto: 60 F
 Dumviva membro 240 F

UFE kun "Revue Française" 80 F
 UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 110 F
 Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" 35 F
 Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

+++++

Dépôt légal: 1er trimestre 1979 !!! Polycopié par F. M. C.
 Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
 Directeur-gérant: Gaston VERON !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE